

Fina raporto al la komitato de la labor-grupo pri ekvilibro de la financa situacio de UEA

1. En la buĝetoj de UEA videblas, ke estis defcito dum la lastaj jaroj kaj antaŭvideblas, ke ankaŭ en la estonta tempo okazos la samo, se ni ne faros seriozan strukturan reformon. La elspezoj estas kutime pli altaj ol la enspezoj en grandeco de cent-mil-eŭra (aŭ eĉ pli alta) malprofito jare. Se ni ne faros ion, tiam ni en ne tre longa daŭro komplete perdos la libere rekte uzeblan posedaĵon de nia organizaĵo, kiun niaj antaŭuloj kolektadis dum pli ol cent jaroj. En la daŭro de nur 5 jaroj ni ne plu entute povos pagi salajrojn kaj aliajn elspezojn kaj ni devos komenci vendi la domon kaj uzi la investitan monon. Ĉiuj membroj de nia laborgrupo opinias, ke tio ne estas akceptebla. Cetere la investita mono estas mono de fondaĵoj, el testamentoj, kiuj venis al UEA kun specifa celo, aŭ mono de la membroj en siaj UEA-kontoj, do uzi ĝin por la administraj elspezoj de UEA estas ne nur morale neakceptebla sed supozeble eĉ kontraŭleĝa.

2. Se ni analizas la aĝojn de nia membraro, antaŭvideblas, ke la risko, ke UEA malfortiĝos kaj estos en neeltebeble malfacila financa situacio, signife pligrandiĝos en la venontaj jaroj. Laŭ la aĝo-strukturo prezentata en la aldonaj klarigoj antaŭvideblas, ke post deko da jaroj la nombro de nia membraro estos multe pli malgranda ol la nuna nombro (se ni ne trovos efikajn metodojn plialtigi la membronombron kaj plijunigi la membraron, kion neniu sukcesis fari dum la lastaj jardekoj). Simple oni povas diri, ke de nun ĝis 20-30 jaroj la plej granda parto de nia nuna membraro estos malaperinta pro forpaso kaj restos ĉefe nur malmultaj nun junaj membroj.

3. Ĉar temas pri longdaŭra struktura defcito, oni povas malaperigi ĝin nur per longdaŭra plimalgrandigo de la elspezoj kaj pligrandigo de la enspezoj. Oni devas provi eluzi ĉiujn rimedojn je dispono kaj agi en ĉiuj kampoj por malgrandigo de elspezoj kaj grandigo de enspezoj.

4. UEA povos plej efike plimalgrandigi siajn elspezojn per la plimalaltigo de la ĉefaj kostoj. La plej grava sumo inter la elspezoj en la buĝeto por 2018 estas la 313,500.- eŭra kosto de la oficistaro. La membroj de nia labor-grupo pensas, ke estas ebleco plimalgrandigi tiun sumon, ekzemple per laŭgrada ĉesigo de kelkaj taskoj kaj funkcioj neesencaj aŭ per laŭgrada transdono de ili al personoj laborantaj en aliaj malplikostaj mondopartoj, kiam la nunaj prizorgantoj pensiiĝas. La reta administra sistemo reŝarĝata nun devos ebligi tion. Tio nur et-parte estas farebla en 2018 sed ĝi devas esti farata pli kaj pli en la tuj postaj jaroj.

5. Ankaŭ aliaj ebloj ekzistas por plimalgrandigi la kostojn, ekzemple rilate al la Universala Kongreso oni povus aranĝi la laborojn tiel, ke la LKK transprenu pli da taskoj kaj la okupiĝantoj en la CO restu nur la konstanta kongresa sekretario eventuale kun helpo de volontuloj. Pri la libroservo ni konsideras, ke ĝi tendence vendas malpli kaj malpli da libroj, kaj sekve ĝi ne plu estas profitodona. Estas pripensinde klara analizo por decidi, ĉu eblas reatingi situacion de profito aŭ ĉu ni devas transdoni tiun taskon al alia organizaĵo (ekzemple al jam ekzistanta alia libroservo ie en la mondo), kiu senpage aŭ eĉ profitdone povus funkcii. Ankaŭ tio estas nur et-parte farebla en 2018.

6. Nuntempe estas signifaj diferencoj inter la kostoj en la riĉaj kaj malriĉaj landoj, do (same kiel industriaj kaj komercaj entreprenoj faras) estas pripensinde, ke oni funkciigu la laborojn de la Centra Oficejo (almenaŭ parte) en malmultekostaj landoj, prefereble kontraktante por difinita laboro ol per dungado en aldona sidejo.

(Ekz. kiel oni jam faras por redakti la revuon Esperanto). Tiel eblus signife malgrandigi la kostojn kaj universaligi nian movadon. Tamen indas ankaŭ konservi la nunan oficejon en Roterdamo, kie estus dungotaj nur malmultaj oficistoj, prefere helpataj de volontuloj. Tiel certe eblus efike ekvilibrigi la financon bilancon de UEA kaj eblus vivkapabligi la organizon por multaj jardekoj. Ankaŭ tio estas procedo por la venontaj kelkaj jaroj.

7. Estas pripensebla kaj facile realigebla konkreta celo, ke oni provu ŝpari 10% en la unuopaj antaŭvidataj elspezolinioj de la buĝeto por 2018.

8. Se temas pri pligrandigo de la enspezoj la labor-grupo rekomendas, ke oni proponu al la komitato por la venonta jaro altigon de la kotizoj je 10%. Samtempe oni intensigu la agadojn por membrovarbado, donacovarbado inkluzive de heredaĵoj kaj aŭtomatigo de la membrerenovigo almenaŭ por A-landoj. Ankaŭ kampanjoj por instigi vendojn de la libroservo estas pensindaj. Fine oni utiligu la volontulan domon tiel, ke ĝi estu ĉiam plene loĝata, ĉar aliokaze la domo ne portas helpon al la buĝeto. Ankaŭ eksteraj subvencioj por movada evoluigo kaj aliaj celoj estas petendaj.

Samtempe la estraro tuj komencu pristudi simpligon kaj renovigon de la membro-sistemo, kiu laŭeble baziĝu sur unu kotizo kaj aldono de abono aparte por paperaj servoj. Esence oni komisiu oficiston aŭ komisiiton pristudi la tutan oferton de produktoj kaj servoj. Paralele oni pristudu altigon de la pago por aligitaj membroj kaj formoj de helpo fare de la landaj asocioj.

9. Por Esperanto-gazetoj, kiel por ĉiuj gazetoj, la maniero legi ŝanĝiĝas tiel, ke malpli da homoj legas papere aŭ PDF-formate, sed legas rete je html-formato kaj bezonas paperan version nur por specifa legado. Certe tiu propono helpas re-ekvilibrig nian buĝeton, kaj ĝi ankaŭ provizos la legantojn per pli taŭga servo rilate la nuntempajn bezonojn. Ĉefe por la homoj, kiujn ni devas allogi por ke ili membriĝu kaj restu membroj. Indas pripensi, ĉu de tuj oni komencu efektiviĝi la jenan politikon jam sekvatan de multaj Esperanto-organizaĵoj tra la mondo :

- eldoni la gazetojn ĉefe rete (je html-formato), aldonante artikolojn monate, semajne, tage...
- eldoni pdf-version de Esperanto kun papera eldono por estontaj paperaj abonantoj, 4 foje jare (aŭ malpli ofte), kaj igi ĝin abonebla ek de kiu ajn numero dum la jaro.
- konsideri ĉu rezigni pri pdf kaj papera versioj de Kontakto, eldonante tiun revuon nur html-formate.
- eldoni la jarlibron ĉefe rete, kaj aperigi resumon de ĝi en unu el la pdf/paperaj versioj de Esperanto kiu povus fariĝi duobla numero.

10. Interalie oni devos atenti pri la konto-sistemo de UEA kaj pri ĝia plia aŭtomatigo.

11. La plej grava afero estas ke ni vivkapabligu nian asocion ne nur per financa ekvilibrigo, sed ni faru ankaŭ reformojn, kiuj celas modernigi nian agadon por ke la esperantistoj de la dudekunua jarcento trovu niajn servojn allogaj kaj utilaj. La ĉefaj fortoj de asocioj, ĝenerale, de Esperanto-asocioj kaj de UEA, estas la homoj kiuj kontribuas kaj finance kaj per aktivado al la celoj de la asocio.

Por ke membroj malfacile varbitaj remembriĝu jaron post jaro necesas, ke ili sentu sin gravaj por Esperanto kaj UEA, ke ili sentu, ke ilia agado kaj opinio utilas. Necesas vera dudirekta komunikado inter la individuaj membroj kaj la gvidantaro de UEA. Estas ankaŭ pripensinde, modernigi la rilatojn inter UEA kaj la aliĝintaj asocioj por pli bone kunordigi la agadojn de la movado.

Antaŭvideblaj efikoj je la nivelo de la deficino en la venontaj 5 jaroj

Se la Komitato emas realigi la proponojn de nia laborgrupo laŭgrade sen radikalaj ŝanĝoj tiam la venontaj deficinoj antaŭvideblas jene:

- 2019 deficino	80 000 eŭroj
- 2020 deficino	80 000 eŭroj
- 2021 deficino	70 000 eŭroj
- 2022 deficino	70 000 eŭroj
- 2023 deficino	50 000 eŭroj
- 2024 deficino	0 eŭroj

Se la Komitato celas pli rapide atingi financon ekvilibron tiam pli radikalaj ŝanĝoj estas bezonataj, ekzemple maldungo de oficistoj, pli rapida translokigo de laboroj el la CO al malmultekostaj landoj, ktp.

Pliaj detalaj klarigoj pri la punkto 1-a

Laŭ la 2016-jara financa bilanco de UEA la tuta malneta posedaĵo de UEA estis iom malpli ol 6 milionoj da eŭroj. La kreditoroj estis 2.4 milionoj, do la neta posedaĵo estis pli-malpli 3.6 milionoj da eŭroj. Tio ne ŝajnas esti malbona, tamen se ni analizas la detalojn, tiam ni povas konkludi, ke la financa situacio de nia organizo estas malstabila. La kialoj estas diversaj, unue menciindas, ke granda parto de tiu mono ne uzeblas libere (ekzemple por kovri la kostojn de funkciado de nia asocio), sed ili estas uzeblaj por difinitaj celoj. (Ekzemple el la Afrika Fondaĵo oni rajtas nur evoluigi la afrikan movadon, ktp.).

En la bilanco la ĝenerala kapitalo estas preskaŭ 1.800.000 eŭroj, kaj ankaŭ tiu kapitalo estas nur parte uzebla libere kaj rekte. Ĉar ene de tiu sumo estas la valoro de la domoj, postuloj, la stoko de la libroservo kaj similaj. Se oni subtrahas tiajn valorojn restas nur ĉ. 660.000 EUR, kiuj estas rekte kaj libercele uzeblaj. Nia buĝeto nun enhavas ĉ. 150 mil euran deficon kaj se similaj deficioj okazos ankaŭ en la venontaj jaroj, tiam estos risko, ke UEA bankrotos post kvar aŭ kvin jaroj. UEA havas grandan parton de sia mono en valorpaperoj, do estas ankaŭ risko, ke la valoro de tiuj paperoj malaltiĝos, se okazos neantaŭvidebla krizo en la borsa merkato.

Menciindas, ke la asocion savis du membroj en la pasintaj jaroj. En 1999 fluis al la kapitalo heredaĵo de ĉirkaŭ 900.000 EUR kaj en 2010 temis pri ĉirkaŭ 450.000 EUR. Sen tiu mono la asocio jam delonge estus bankrota. De 2011 la kapitalo restis stabila aŭ iomete kreskis, kvankam fluis konstantaj subvencioj al la spezokonto. Tio okazis danke al unu de la plej longdaŭraj kreskoj ĉe la borso sed neniu scias, kio okazos en la borso post du, tri aŭ kvar jaroj

Pliaj detalaj klarigoj pri la punkto 2-a

Aĝstrukturo de Membroj de UEA 2017 (18-10-2017)

Publikigita de [Martin Schäffer](#) ĵaŭ, 2017-10-19 21:58

La membroj de UEA estas relative aĝaj. 44,63% de niaj membroj estas super 65 jaroj. 55,37% estas inter 16 - 65 jaroj. En Germanio (ekzemple) nur 24,26% de la loĝantoj estas super 65 jaroj. Dume 75,74% estas inter 15 ĝis sub 65 jaroj. Plej draste la malekvilibro kompare al "normala statistiko" estas videblaj ĉe la homoj inter 66 - 70 jaroj. Je 18-10-2017 ĉe ni membriĝis 515 homoj en tiu aĝgrupo. Tio egalas al 12,93%. Dume en Germanio en tiu aĝgrupo nur troviĝas 6,07% (personoj ĝis 16 ellasitaj same kiel ĉe UEA). Tute kontraŭe la situacio estas ekzemple ĉe la aĝgrupo 36 - 40 jaroj. 3,51% de nia membraro troviĝas en tiu aĝgrupo. Dume laŭ la statistiko el Germanio devus esti 6,95%. Speciale la junaj membroj do estas subrepresentitaj kompare al la maljunaj membroj. Indas do eltrovi, kial la pli junaj Esperanto-parolantoj tiel malmulte aliĝas al UEA. Eble necesos fari enketon pri tio ĉe tiu aĝgrupo.

